
ILI NE KOMPRENAS UNU LA ALIAN,
ĈAR ILI ESTAS MALSAĜAJ BESTOJ
KAJ NE UZAS UNU LINGVON!
SED NI, HOMOJ...





E

1983·5·98

# starto

KDS
Sedlčany
KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha



## N'I NE VOLAS STARI FLANKE !

Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Esperantista Klubo de Pacdefendantoj en Pardubice invitas ĉiujn bonvolajn homojn al la komuna kaj solena porpaca renkontiĝo, kiu okazos en la tagoj de la 23-a ĝis 25-a de marto 1984 en Pardubice, ĈSSR. Tiu ĉi agado jam superkreskis limojn de la loka aŭ asocia interesoj, eĉ kaj ĉeĥoslovakaj ŝtatlimoj. Oni povas ankaŭ diri, ke nia pacrenkontiĝo ne estas nur Esperanto-agado, ĉar multe da homoj, kiuj cetere eĉ ne estas anoj de nia asocio, aktive partoprenas.

Ni volas dum la 6-a RENKONTIĜO DE PACDEFENDANTOJ EN PARDUBICE ripete kaj ankoraŭ pli akcente diri nian senduban N E al la milito kaj pasian J E S al la paca vivo kaj interkompreniĝo inter la nacioj. Ni premos la manojn al ĉiuj, kiuj deziras kiel ni instali trankvilan vivon, plenan de la kompreno por la aliaj.

Alvenu esprimi ne nur per via partopreno, sed ankaŭ per viaj vortoj, ke tiu ĉi afero ne estas indiferenta al vi. Alvenu ankaŭ vi neformale propravole protesti kontraŭ plua gradacio de la militpreparoj.

NI VOLAS PACON POR NIA BLUA PLANEDO!

NI VOLAS PACON POR ĈIUJ INFANOJ DE LA MONDO!

La tutan kunvenon de la pacdefendantoj en Pardubice ni volas solide prepari kaj bone aranĝi. Tiukaŭze ni bezonas jam nun koni almenaŭ proksimume nombron de la partoprenantoj. Tial forsendu la aliĝilon TUJ! La aliĝilon vi trovos kiel poŝtkarton kun plena adreso de nia asocio en ĉi tiu STARTO.

Ni elkore invitos ankaŭ neesperantistojn, lernantojn de la skribaj E-kursoj, kiuj la unuan fojon renkontos kaj ekkonos siajn instruistojn. Ni volonte invitos ankaŭ esperantistojn el la najbaraj kaj el la aliaj ŝtatoj. Ni plezure invitos ankaŭ elstarajn personojn de la internaciaj kaj fakaj Esperantaj organizajoj, redaktorojn de la E-o gazetoj kaj radioelsendoj.

La renkontprogramo estos jam tradicie multvaria :

- diskutoj,
- interkona kaj danca vesperoj,
- ekspozicio okaze de la 15 jaroj de ekzisto de ĈEA,
- aŭtobusa ekskurso
- ekskurso al historia parto de la urbo Pardubice,
- vizito de ia ] uzino aŭ de Agrokultura Kooperativo,
- fotoservo kaj vendejo, plena de la libroj kaj aliaj E-materialoj, kiujn vi serĉas,
- kultura matineo ,

Loĝigon kaj manĝaĵon ni certigas nur kelke da paŝoj de la Kulturdomo DUKLA, kie ni la tutan renkontiĝon arangos. Kompleta loĝigo por du noktoj /tranoktadon nur por unu nokto ni ne povas garantii/ en studenthejmoj kaj manĝaĵo kostas entute Kĉs 160,--. La partoprenkotizo /Kĉs 35,--/ inkluzivas memora-

ĵojn, insignon de la renkontiĝo, eblecon uzi stampilon de la renkontiĝo, aŭtobusajn ekskursojn. enirbiletojn je la kultura matineo kaj dancvespero eĉ la dokumentojn el la pacrenkontiĝo.

NI ATENDAS VIN, ALVENU KUN VIAJ FAMILIANOJ KAJ AMIKOJ. NI SUBTENU PER NIAJ AKLAMO KAJ PARTOPRENO CERTIGAN KAJ KONKRETAN PROTESTON KONTRAŬ MILITPREPAROJ!

Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Prago, kun
Esperantista Klubo de Pacdefendantoj,
Pardubice.

---



# FORPASIS SAMIDEANO JOSEF VÍTEK LA UNUA PREZIDANTO DE ĈEA

Kiam ni antaŭ du jaroj festis la sepdekjariĝon de samideano Josef vítek / Starto 2/81/ kaj esperis, ke li ankoraŭ longe helpos al la prosperigo de Esperanto en nia lando, ni ne supozis, ke ni tiom baldaŭ ekscios pri lia morto.

Josef Vítek mortis post grava malsano la 8an de novembro 83. Kun li mortis unu el plej elstaraj kaj plej konataj esperantistoj en nia lando.

Li naskiĝis la 25an de majo 1911 en Horŝov / okcidenda Bohemio/ kaj laboris tutan sian vivon kiel instruisto. Multaj generacioj memoras lian pedagogian laboron en diversaj lokoj en Ĉeĥoslovakio / li laboris poste multajn jarojn en Slovakio / kaj multaj liaj lernantoj fariĝis poste fervoraj esperantistoj.

Josef Vítek fariĝis esperantisto en 1924, ŝtate ekzamenita li estis en 1930 en Bratislava. Kiel faka instruisto li deĵoris en Tisovec,kie li instruis Esperanton en urbana lernejo dum vico da sinsekvaj jaroj. Post 1939 li estis instruisto en Hradec Králoyé,kie li aktivis en la loka organizo, li kunagis por okazigi ĉiujarajn kursojn, en 1946-1947 por okazigi ĉiusemajnan elsendon de la orientbohemia radiostacio. De post la 1946 li konstante kunlaboris en Somera Kolegio en Doksy kaj en Somera Tendaro en Lančov.

Li estis fondinto de la Esperanto-klubo Comenius en Tisovec 1930-1938, li estis aktiva membro kaj plurfoje prezidanto de Esperanto -klubo en Hradec Králové,Praha kaj Mělník. Estas lia granda merito, ke estis eldonita la plej granda Ĉeĥa Esperanto vortaro de fratoj Filip.



Samideano Vítek havis grandajn meritojn ankaŭ pri la propagado de Ĉeĥoslovakio en fremdlando. Laŭ komisio de ministerio pri informado li prelegvojaĝis pri Ĉeĥoslovakio en Svedio, Danlando kaj Norvegio en jaroj 1946 -1947. Sendita en Parizo en 1949 kiel instruisto por ĉeĥa lingvo li ligis plurajn kontaktojn kun eksterlandaj samideanoj.

Josef Vítek enorme meritiĝis pri la renovigo de la postmilita Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Li estis la unua prezidento de Tutŝtata kunsulta komitato esperantista en la jaroj 1955-1957, en la jaroj 1959-1969 gvidanta funkciulo de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato kaj post la jaro 1969 la unua prezidanto de Ĉeĥa Esperanto Asocio. Lia saĝeco, spertoj,bonaj rilatoj al homoj, realismo , vigleco malofte estas tiel kunigitaj en unu persono. Samedeanon Vítek, kun kies nomo estas ligita nova historio de Esperanto - movado en socialisma Ĉeĥoslovakio ni neniam forgesos.

PhDr J. Jermář Z. Křimský

---

# LITERATURA KONKURSO DE ĈEA

Komence de la jaro 1983 estis anoncita la literatura konkurso okaze de la 5-a Esperantista Kultura Festivalo,kiu efektiviĝis en la tagoj 16. - 18.9.1983 en urbo OPAVA. La konkurson preparis Ĉeĥa Esperanto-Asocio celante malkovri novajn talentojn por tradukadi ĉeĥajn verkojn Esperanten. La konkurso, kies detalajn informojn alportis la unua dunumero de STARTO, havis du branĉojn: la prozan kaj la poezian.

Ĝis anoncita limdato venis entute nur 7 tradukoj - 6 tradukoj prozaj kaj unu poezia. Ne ĉiuj konkursaj kontribuaĵoj plenumis plene la kondiĉojn de la konkurso. Tamen, la ĵurio, kiun formis A. STAŇURA - estro de la Lingva komisiono de ĈEA, E.URBANOVÁ - poetino kaj d-ro med. J. HRADIL - redaktanto de periodaĵoj SANO kaj VERDA FAMILIO, estro de la Medicina sekcio de ĈEA, anonime pritaksis ĉiujn alvenintajn kontribuaĵojn, ĉar la fina nombro de partoprenintoj ne estis kontentiga.

La finaj rezultoj, kiuj estis publike proklamitaj dum la 5-a Esperantista Kultura Festivalo en OPAVA la 17-an de septembro 1983 estas jenaj:

BRANĈO POEZIA:

La 1-a kaj la 2-a premioj ne aljuĝitaj.
La 3-an premion ricevis s-ano inĝ. Karel JANOUŠ el OSTRAVA por traduko de poemo SILENTE far Jozefo RUMLER.

BRANĈO PROZA:

La 1-an premion ricevis s-ano Jiří PATERA el PRAGO por traduko de la humura rakonto INTER BIBLIOFILOJ far Jaroslav HAŠEK.
La 2-an premion ricevis s-anino Jarmila PASTRŇÁKOVÁ el OSTRAVA por traduko de VERA RAKONTO far Pravdomil DOSTÁL.
La 3-an premion ricevis s-ano Jozefo CINK el ČERVENÁ VODA por traduko de prozo MI REVENOS TIEN ... far František HALAS.

La premioj estis solene transdonitaj al la gajnintoj dum la Arta vespero de la 5-a EKF.

Ĉiuj premiitaj tradukoj estos laŭbezone uzotaj por niaj el-

donaĵoj. La ceteraĵn oni uzos sammaniere post lingva korekto kun konsento de la tradukintoj.

La anoncita konkurso plenumis sian celon nur parte. Oni rikoltis kelkajn novajn tradukojn, tamen tute novajn talentojn oni ne malkovris, ĉar ĉiuj gajnintoj pli malpli jam literature kunlaboras kun la asocio. Malgraŭ tio la centra komitato de ĈEA opinias, ke tiu ĉi formo estas konvena kaj utila kaj tial oni kalkulas kun ĝi ankaŭ en estontaj jaroj.

Vl. Kočvara

PARDONPETO PRO MALFRUIĜO

Pro la neatenditaj problemoj kun la homoj,kiuj promesis prepari nian STARTO-n decidis estraro de asocio, ke ĝis ni trovos aliajn konlaborantojn denove prizorgu eldonadon kaj redaktadon de numeroj, komence de n-roj 5+6/83 Zdenko Křimský, sekretario de asocio. Ĉar iomete trankviliĝis situacio en sekretariejo eĉ liaj personaj kaŭzoj, li provizore akceptis. Ni esperas, ke vi STARTO-n numero 6/83 ricevos sinsekve en malonga tempo post ĉi tiu numero.

Redakcio

# EKF en Opava

La 5-a EKF sukcesis. La tagoj de la 16-a ĝis la 18-a de septembro estis en OPAVA sub signo de la 5-a EKF. Ĝi fakte preskaŭ oficialiĝis, ĉar ĝi estis enviciĝita en la tradician kulturan semajnon BEZRUČOVA OPAVA. Sekve de tio ricevis la 5-a Esperantista Kultura Festivalo vastan propagandon kaj ankaŭ gravan rekonon de urbaj kaj distriktaj oficialuloj.

La festivalaj tagoj enhavis buntan enhavon, kiun sekvis inter 60 ĝis 110 spektintoj.

Ĉeestis esperantistoj ĉefe el Moravio, el eksterlando oni bonvenigis eminentan delegitaron de BEA - gesamideanoj L. MICHAJLOV, B. BELEVA, P. PAPAZOVA, C. MITEVA, N. UZUNOV, I. MICHAJLOV, plue reprezentanton de AGE de GDR kaj gastojn el Pollando. En arta parto de la festivalo partoprenis bulgaraj artistoj, J. HANDZLIK el Pollando, M. SMYČKA kaj Kantĥoro de Sileziaj Instruistinoj.

La 5-a EKF sukcesis pli ĉe la oficialaj institucioj ol ĉe la esperantistoj mem. Dum la lasta kunsido de komisiono por la kultursemajno BEZRUČOVA OPAVA estis transdonitaj dankoj de la Konsilantaro de Urba Nacia Komitato en OPAVA al ĉiuj organizintoj de la 5-a Esperantista Kultura Festivalo.


Kune kun ĉi tiu festivalo estis ankaŭ malfermita ekspozicio de la pentraĵoj de nia kunlaboranto en redakcioj de STARTO, PACO kaj SAMO, jam konata pentristo en ĉeĥa satira gazeto DIKOBRAZ- Pavel R A K .

Sur foto estas videbla dum la vernisaĵo. Kiu ne vidis liajn pentraĵojn, ankaŭ el esperantista medio, venu en PARDUBICE ! Tie, dum VIa porpaca kunveno, ni intencas ekspozicii liajn pentraĵojn denove.







# el junularo vivo

**NOVA INTERKLUBO.** Dudek studentoj de gimnazio en BRUNTÁL laboras ekde septembro en novfondita Interklubo. Krom lernado de Esperanto ili organizas ankaŭ kulturajn kaj edukajn programojn por ĉiuj studentoj: prelegon de partoprenanto de packongreso en Prago, projekciadon de diapozitivoj el kongresoj de UEA, informigon pri internacia agado de MEM kaj UEA, eblecon partopreni SET en LANČOV. Gimnazianoj el BRUNTÁL serĉas ankaŭ korespondantojn kaj geamikojn. En decembro ili planas organizi letervesperon.

Ni do petas vin, legantojn de STARTO, gesamideanojn el ĉeĥoslovakaj kluboj, junularon el eksterlando, ciujn simpatiantojn - bonvolu skribi al ni, bonvolu helpi al ni propagandi Esperanton kaj akiri internaciajn kaj enlandajn amikajn kontaktojn.

Ni ĝojatendas viajn leterojn, bildkartojn, salutojn.Dankon!

Interklubo - gimnazio, 792 01 BRUNTÁL, ČSSR.

**NORDMORAVIA JUNULARO AKTIVAS.** Dum kultura festivalo en OPAVA kunvenis la 17-an de septembro 1983 junaj esperantistoj el nordmoraviaj urboj OSTRAVA, OLOMOUC, OPAVA, FRÝDEK, PŘEROV, ŠUMPERK kaj aliaj lokoj. Ili pritraktis eblecojn de pli bonaj kontaktoj kaj partopreno en komunaj entreprenoj organizitaj per lokaj kluboj kaj rondetoj. Aperis multe da interesaj proponoj kaj konkretaj ofertoj de programoj turismaj, kulturaj kaj edukaj, ekzemple ekskurso en GDR, turismaj renkontiĝoj en montaro, marŝo tra distrikto OPAVA,festo de datreveno de klubo en PŘEROV ktp. Eblas ankaŭ partopreni diversajn aranĝojn de najbaraj slovakaj distriktoj.

Krome oni planas ankaŭ plialtigi la lingvonivelon de junaj esperantistoj. En kunlaboro kun pedagogia sekcio oni intencas eldoni materialojn preparantajn la junularon al lingvaj ekzamenoj.

Reprezentantoj de unuopaj rondetoj kunvenados regule por pritrakti la planojn de plura agado. Pri aktiveco de nordmoravia junularo informiĝis ankaŭ estraro de Junulara sekcio de ĈEA dum sia kunveno en ŽĎÁR NAD SÁZAVOU.

VOĈO EL KONGRESEJO. Okazis JUNULARA VESPERO. TEJO prezentis sian programeron. Ĝi ŝajnis tre kuraĝa kaj atingis multajn simpatiojn ĉe junaj partoprenintoj. Reprezentantoj de TEJO klopodis per imitado de UEA-estraranoj klarigi interrilatojn UEA - TEJO, ankaŭ esprimi sian opinion pri la malfermo. Ili timis riproĉi erarojn nek al la prezentado de E-himno, nek al salutoj de esperantistoj el diversaj landoj. Ankaŭ ili provis kontraŭstari anglan kaj Esperantan lingvojn kiel la lingvoj-rivaloj klopodantaj esti akceptitaj kiel lingvoj internaciaj. Por montri la problemon ili uzis prelegon de s-ro BUTTLER kun Esperanta traduko.

Ĉion ili diris helpe de ironio kaj sarkasmo, sed devigis nin al pripensado: kiun motivon havis junularo prezenti ĉi tiun scenon? Laŭ la prezentado oni ŝajnis kvazaŭ kunlaborantoj de s-ano MAERTENS estus troaj "estraranoj"...

Dum la dua tago ni hazarde sukcesis trinki bieron kun s-ano MAERTENS en la kongresejo. La komuna trinkado okazis posttagmeze kaj li aspektis tre lacege. Li konfidis al ni, ke la tutan tagon li ne havis tempon ion manĝi. Malgraŭ tio nia prezidanto restadis sincera homo, tute ne prezidantema "lia moŝto"...


Ni esperas, ke nia mallonga interbabilado ĉe la biero refreŝigis lin same, kiel donis al ni novajn fortojn por nia movada laboro.

**Svatava Antošová**

JUNULARAJ SKI-TAGOJ

Ski-tagoj de la junularo estos en ŠPINDLERŮV MLÝN, ČSSR /Kčs 200,-- sen manĝado/ en la tagoj de la 16-a ĝis la 22-a de januaro 1984. Informoj: Junulara sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 PRAGO 1. Skribu tuj!

## Scienc-teĥnika sekcio de ĈEA



SEMINARIO PRI APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEĤNIKO AEST '84 okazos de la 31-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro en BRNO kun la temo PERSPEKTIVOJ DE LA MONDA NUTRAĴPRODUKTADO. Ĝis septembro 1983 aliĝis 43 partoprenontoj kun 12 prelegoj /8 fakaj kaj 4 terminologiaj/. Ĉu vi ne ŝatus ĉeesti, ĉu kun aŭ sen prelego? Kontaktu Inĝ.Z.PLUHAŘ, CS 507 51 HOLOVOUSY V PODKRKONOŠÍ 109.

KONSTANTA INTERNACIA KVALIFIKEJO /KIK/ startis la unuan fojon en la bulgara VARNA /de la 9-a ĝis la 23-a de aŭgusto 1983/. La kurso por kvindeko da plejparte junaj funkciuloj de E-asocioj en la socialismaj landoj ampleksis ankaŭ prelegojn pri la uzo de Esperanto en scienco kaj teĥniko kaj pri la fakaj kaj sciencaj institucioj en la E-movado. /Prelegis doc. d-ro V.NOVOBILSKÝ, CSc./.



KOMPUTIKA VORTARO /Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta/ de Inĝ.F.CABÁK estis eldonita de ĈEA sub aŭspicio de la scienc-teĥnika sekcio. Redaktis ĝin Inĝ.J.WERNER. La nova volumo en la serio VORTAROJ estas mendebla ĉe ĈEA, Jilská 10, 110 00 PRAGO por Kčs 16,--.

LA ROLO DE LA EKOLOGIA FAKTORO EN LA TERITORIA KAJ URBOPLANA ORGANIZO DE LA VIVMEDIO KAJ LA PRODUKTOPOTENCOJ. Sub tiu ĉi titolo okazos en majo 1984 la tria konferenco SVIEKO '84. Oficialaj lingvoj estos la bulgara, rusa, angla, franca kaj Esperanto. Korespondadreso: Bulgario, 5250 SVIŠTOV, VFSI D.A.CENOV, organiza sekretario de SVIEKO '84 -Inĝ.Vasil BOTEV.

LA UNUA INTERNACIA SIMPOZIO PRI INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO okazis inter la 2-a kaj 8-a de majo 1983 en MASSA, Italio. Oni aŭskultis 7 prelegojn de prof.F.PENNACCHIETTI, prof.I.SZERDAHELYI, prof. H. FRANK kaj prof. G. FORMIZZI.

ESPERANTO VE SLUŽBÁCH VĚDY /Esperanto en servoj de scienco/ estas tre bona informa artikolo de Inĝ. F. CHRDLE, kiu aperis en la popularscienca revuo VĚDA A ŽIVOT /S C I E N C O K A J V I V O/, 8/83, pĝ. 561 - 563.

## A N K A Ŭ B L I N D U L O J K O N G R E S I S

En la tagoj de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1983 okazis en Budapeŝto, guste post la 68-a UK, la 51-a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj. La dato estis elektita tiamaniere, ke la nevidantaj interesiĝantoj povu laŭvice partopreni ambaŭ aranĝojn.

La kongreson partoprenis 182 blindaj esperantistoj kaj iliaj akompanantoj el 19 landoj. El Ĉeĥoslovakio venis 9 personoj.

La programo estis tre riĉa: la partoprenintoj aŭskultis kelkajn blindulfakajn referaĵojn, ĉeestis du kunsidojn de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj /LIBE/, konatiĝis kun la urbaj vidindaĵoj, pasigis unu tagon ĉe la lago Balaton kaj aktive prezentiĝis en la internacia arta vespero.


Dum la kongreso ĉiuj delegacioj informis la ĉeestantojn pri la stato de blindul-esperantista movado en siaj landoj. Tiam ankaŭ nia delegacio povis raporti pri la sufiĉe riĉa agado de nialanda blindulsekcio de ĈEA.

Unu apartan kunvenon havis la partoprenintoj el socialismaj landoj, kiuj pridiskutis /ankoraŭ senrezulte/ la eblecojn de la aniĝo al LIBE.

El la iniciato de nia delegacio okazis du sukcesaj aranĝoj. En la diskuto de redaktoroj de la porblindulaj Esperantaj brajlo- kaj songazetoj ni konatiĝis kun la enhavo, ekspedado kaj diversaj sugestoj koncerne la periodaĵoj. En la aparta kunsido priparolis redaktoroj de la gazetoj reciprokan kunlaboron, intersanĝon de la gazetoj kaj "dividon de interessferoj" koncerne la enhavon. La kunveno okazis unuafoje en la historio de la porblindula Esperanto-movado.

Kun ĝojo ni aŭdis, ke la blindulgazeto AŬRORO, kiun en Esperanto-brajlo eldonas Ligo de Ĉeĥaj Invalidoj kaj senpage dissendas en la tutan mondon, estas multe ŝatata de la eksterlandaj legantoj.

/J.V./



# ni recenzas

Julio Baghy: LA VERDA KORO. Facila romaneto por komencantoj. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio Budapeŝto, 1982.Kun ilustraĵoj de P. kaj M. Ehrlich kaj sintaksa resumo de K. Kalocsay. Paĝoj 104, formato 16 x 20,5 cm, kartonita, prezo ne indikita.

Nia elstara poeto, verkisto kaj lingvofakulo kondukas nin en tiu ĉi ĉarma, grandparte aŭtobiografia romaneto, en Siberian kaptitejan Esperanto-kovejon, kie en malfacilegaj vivkondiĉoj ĝermis, burĝonis kaj ŝosis la verdaj koroj, la novaj diversnaciaj esperantistoj. Antaŭ mi kvazaŭ riveliĝus okazaĵoj, pri kiuj al ni rakontadis la kunpartopreninto de J. Baghy, la karmemora vicprezidanto de la Brna klubo, supera fervoja konsilisto Jozefo Friedrich. Oni travivas la jarojn de la unua mondmilito kaj la sekvintajn, 1917 - 1923, tiujn por Esperanto idiliajn jarojn, kiam ŝajnis, ke la pacavida mondo akceptos IL, kiam la gazeto Esperanto Triumfonta eldonata de Teo Jung en Horrem en Germanujo aperadis regule ĉiusemajne, ja dum kelka tempo eĉ pli ofte, kaj estis aĉetebla ekz. en Liberec en ĉiuj gazetvendejoj, kun tri paĝoj da korespondadresoj,kiam niaj semajnaj klubkunvenoj estis abunde vizitataj /ĉar nek radio nek televido tenis la homojn hejme/ ...

La ĉapitroj de la romaneto verkitaj kun la Baghy-eca emociivo, kun enplektitaj delikataj amepizodoj, estas aranĝitaj laŭgrade koncerne facilecon. La gramatiko kaj vortaro Esperanta-hungara por ĉiu ĉapitro-leciono estas donita sur p. 74 - 104 . Tiun aminde belan verketon - instruilon kun modela lingvaĵo kaj kun nemultaj preseraroj mi povas rekomendi kaj por kursanoj kaj por ĉiuj lingvospertaj legantoj.

J. Kořínek

Modeste ekipita, per fadeno kunkudrita libro, kun mola papera kovrilo. Oni devas admiri la oferemon de la vjetnamaj samideanoj, kiuj eldonadas Esperantajn librojn en tre malfacilaj rekonstrukondiĉoj. Tial oni devas kaj morale, kaj materie subteni ilian klopodon kaj aĉeti iliajn librojn.

A. Staňura

Nadija Hordijenko - Andrianova: UKRAINAJ POPOLAJ FABELOJ. Redaktis Lidia Raeva, eldonis Bulgara Esperanto-Asocio 1983. Paĝoj 79, ofseta preso, formato 16/22 cm, kartonita,prezo ne indikita.

El la folklora trezorejo de la ukraina popolo kompilis kaj tradukis la aŭtorino 21 fabelojn prezentitajn sur 70 paĝoj kaj kun 7-paĝa erudicia ANSTATAŬA POSTPAROLO, en kiu ŝi inice parolas pri la ukraina folkloro, sed ankaŭ rilatigas fabelmotivojn ripetiĝantajn en la fabeloj de diversaj popoloj kun misteraĵoj el la homara historio, ekz. el regno de Inkaoj, kun malkovroj de Henri Loot en Saharo ks. Kelkio en la fabeloj kaj mitoj povus fonti ne nur el fantazio, sed havi kernon en miregigaj spuroj kaj atestaĵoj el la fora pasinteco konjektigantaj pri kontakto de teranoj kun eksterteraj civilizacioj. La fabeloj mem, pluraj fableskaj, respegulas slavan strebadon al bono, justeco, parolas pri punitaj malhonesto, avareco, fieco. Lingve estas la verketo bonnivela. Mi trovis entute 17 preserarojn kaj du lingvajn korektindaĵojn: p.38 "oni festenis la geedziĝon" /festis/, p. 66 "ŝajnigante sin indignita" / indignanta/. Mi povas la libron rekomendi.

J. Kořínek

HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO. Sub tiu ĉi titolo Ĉeĥa Esperanto-Asocio eldonas la verkon de d-ro Stanislav KAMARÝT. Ĝi ampleksas 256 paĝojn, kostos Kčs 42,-- kaj distribuos ĝin la eldonanto espereble ankoraŭ en la jaro 1983. Ĝi estos bonvena honorigo de la aŭtoro, kiu naskiĝis ĝuste antaŭ 100 jaroj, la 10-an de novembro 1883.

La verko ampleksas evoluon de la movado ekde la jaro 1887 ĝis 1969, kiam fondiĝis la nunaj Esperanto-asocioj ĉeĥa kaj slovaka. Ekipita ĝi estas per indeksoj persona kaj bibliografia.

Pri prespretigo de la verko meritas editora kolektivo konsistanta el J. WERNER, J. MAŘÍK, Z. HRŠEL kaj V. ECHTNER. Al ili helpis plurdekoj da esperantistoj kaj institucioj, liverintoj de diversaj kompletigaj informoj en 1980-82.La subskribinto uzas la okazon kaj tiel ĉi maniere dankas al pli ol sesdeko da demanditoj pro ilia afabla priafera komplezo.

J. Werner

LA FOSTOKIRKOJ DE NORVEGUJO - LA MEZEPOKAJ KIRKOJ KONSTRUITAJ EL LIGNO de Roar Hauglid /Estro de Naciaj Antikvaĵoj/,estas gazetspeca publikaĵo sub kapo NORVEGIO - INFORMOJ, junio 1983, eldonita de la Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj. Sur bona papero kaj 8 paĝoj de formato 21 x 30 cm kun 6 ilustraĵoj kaj 1 mapo pritraktas tiu ĉi kajero en bona Esperanto la pitoreskajn mezepokajn kirkojn, historiajn vidindaĵojn de Norvegio. La interesa kajero estas senpage havebla ĉe : Norvega Esperantista Ligo, Olaf SCHOUSV. 18, OSLO 5, Norvegio.

---

## PROGRAMLABORO DE ARTLITERATURA SEKCIO DE ĈEA EN LA JARO 1984

JANUARO 1984:

Seminario al publikaĵo: DĚJINY ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO HNUTÍ /Historio de ĉeĥa Esperanto-movado/ de la aŭtoroj: Kamarýt, Hršel, Mařík, Werner. Kritika analizo. Informoj pri la publikaĵo estos disponigitaj al scienc-institutoj okupiĝantaj per studado de historio.

FEBRUARO 1984:

Renkontiĝo kun sciencaj laboristoj el la fako de lingvistiko: J. Skácel, aŭtoro de la libro JAZYK JAKO MOST I PROPAST /Lingvo kiel ponto kaj abismo/ kaj dum partopreno de gvid-laboristo en la fako de lingvistiko Jan Petr. La aŭtoroj prezentos sian eksplikon de la problemaro pri internacia lingvo. La partoprenontoj trastudos rekomenditajn verkojn de la menciitaj aŭtoroj.Diskuto al la problemaro de internacia komunikado.

MARTO 1984:

Kritika analizo de la enhavo de literatura Esperanta revuo FONTO. La kritiko direktiĝos al la aŭtoroj kaj proble-

moj, kiujn liveras enhavo de ĉi revuo. La konkludoj estos senditaj al la redakcio por eluzo.

APRILO 1984:
Enkonduko en la poetikon de moderna nuntempa ĉeĥa poezio. Konfronto de tiu ĉi poetiko kaj poetiko tradicia. Estos legitaj specimenoj el la nuntempa ĉeĥa poezio. Rekomendo al la tradukantoj traduki en Esperanton.

MAJO 1984:
Kritika analizo de la traduko MÁJ /MAJO/ de Mácha /traduko de Pumpr/ kaj prikonsidero kiel eldoni ĝin en konvena aranĝo por esperantista publiko.

JUNIO 1984:
Laborbilanco / komitato de ALS /. Plano por la venonta jaro.

JULIO - AŬGUSTO 1984:
La kunvenoj ne okazas /ferioj/.

SEPTEMBRO 1984:
Seminario kaj diskuto al publikaĵo POETO NE MORTAS/Básník neumírá/. Pritakso de la verko de merita artisto František Kožík kaj prijuĝo de la broŝuro eldonota pere de ĈEA okaze de vivjubileo de honorprezidanto de artliteratura sekcio.

OKTOBRO 1984:
Profilo de Esperanta poeto Julio Baghy en la korespondado kun Eli Urbanová. Pritakso de la verkoj de Eli Urbanová.

NOVEMBRO 1984:
Kritika analizo de la romano de geedzoj Kníchal: KIU SEMAS PLORANTE /premiita, eldonota/.

DECEMBRO 1984:
Seminario kaj kunveno ne okazas.

xxxxx

La kunvenoj okazas la lastan sabaton en monato je la 14,00 horo en sekretariejo de KEP en Prago 1, Vejvodova 1.

Alikaze estos dissenditaj la invitiloj.

# RONDETA VIVO

ČESKÉ BUDĚJOVICE

Esperantista klubo "La Progreso" bone kunlaboras kun Socialisma Akademio de ČSSR. Estis preparitaj jam du programoj /lumbildoj kun magnetofono/, kiuj estas prezentataj en unuopaj urbetoj kaj vilaĝoj de distrikto České Budějovice enkadre de prelegoj de Socialisma akademio. La programoj estas prezentataj ĉeĥlingve kaj ekzistas ankaŭ esperantlingva versio. Temas pri programoj : HIROŠIMA - NAGASAKI preparita laŭ japana libro kaj LA SUNO - FONTO DE LA ENERGIO prilaboranta problemon de eluzo de la suna energio por nacia ekonomio.

/pap/

HAVÍŘOV

La postferia agado estis la 1-an de septembro 1983 malfermita per kunveno. Pludaŭras 2 kursoj por progresintoj kaj la 13-an de oktobro ekis E-kurso por komencantoj. La saman tagon estis arangita ekspozicio de Esperantaj publikaĵoj kaj korespondaĵoj. La kursanojn instruas prof. M. PAŠTRŇÁK kaj Zdř. HEISER, kiu ankaŭ prelegis pri sia vojaĝo en Hispanio. Membrino de nia LG, Jarmila PASTRŇÁKOVÁ, ricevis en la tradukokonkurso la 2-an premion! Konkurso estis organizita ĉe okazo de la Esperantista Kultura Festivalo en OPAVA en septembro 1983.

/Ast./

PRAGO

Internacia renkontiĝo organizita de la artliteratura sekcio de ĈEA okazis la 5-an de novembro 1983 en Vejvodova 1, PRAGO 1. La gasto d-ro Miklós FEHÉR el MISKOLC, kiu travojaĝis nian ĉefurbon kun sia edzino, prelegis al dekdu partoprenintoj pri la tradukmaniero el la hungara en Esperanton. Spite pure fakan temon li sukcesis veki ĉe la aŭskultantoj tian intereson, ke plimulto da diskutindaj problemoj restis malfermitaj. Ni esperas, ke ni havos eblon daŭrigi en similaj nepre utilaj kontaktoj kun eksterlandaj literaturistoj.

/Urb/

PŘÍBRAM

Legantoj de STARTO jam kelkfoje legis pri aktiva laboro de Esperanto-rondeto PŘÍBRAM, kiu estas fiksita je progresivaj ideoj de la pacmovado. La longjara agado estis kronigita per honora titolo KOLEKTIVO DE PACBATALANTOJ. Ĝi estis transdonita al E-delegito dum plenkunsido de la Distrikta Packonsilantaro ĉi aŭtune. Estro de l'sindikata domo URANOVÉ DOLY, same kiel prezidanto de la Packonsilantaro, alte taksis ĝisnunan laboron de la klubo kaj ambaŭ klare eldiris, ke oni konsideras E-movadon kiel digna partnero de aliaj organizoj - eĉ pli aktiva, kion fakte pruvas la transdonita titolo.

/M. Turková/

RÁJEC - JESTŘEBÍ KAJ BLANSKO

Lokaj E-grupoj en RÁJEC-JESTŘEBÍ kaj BLANSKO aranĝis la 29-an ĝis 31-an de julio 1983 renkontiĝon. Ĉefa programo estis HELPO AL NIA AGROKULTURO. Post laboro sur kampo aranĝis lokaj grupoj por geesperantistoj el 8 lokoj de ČSSR riĉan programon - ekzemple banadon en valbaraĵo en BLANSKO, viziton de abismo MACOCHA kaj kastelo RÁJEC kaj Moravian pilgrimfeston.

ŠUMPERK

La tradician renkontiĝon apud Esperanto-arbo en Velké LOSINY, kiu okazas ĉiujare la duan majan dimanĉon, partoprenis ĉi-jare 45 personoj el Nordmoravia kaj Orientbohemia regionoj kaj du gastoj el GDR. Post kultura kaj amuza programo estis premiitaj per rememoraĵoj la plej aĝa partopreninto el Olomouc kaj la samideano el plej malproksimita loko BENEŠOV.

La geklubanoj donacis Kčs 250,-- por la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo kontraŭ la Nuklea Milito en PRAGO. Pri tiu ĉi asembleo prelegis en ŠUMPERK ĝia delegito samideano D. KOČVARA la 27-an de septembro 1983.

La 5-an de junio 1983 okazis renkontiĝo kun gesamideanoj el OPAVA en montaro JESENÍKY. Partoprenis ankaŭ la gejunuloj el OLOMOUC.

La 68-an UK en Budapeŝto partoprenis 4 geklubanoj.

Nia E-klubo aranĝis du porpacajn ekspoziciojn de infandesegnaĵoj. La unua okazis kune kun filatelista- kaj fotoklubo de Kulturdomo en la tagoj de la 8-a ĝis la 15-a de julio 1983. Vizitis ĝin 918 personoj. La 12-an de septembro estis malfermita la dusemajna ekspozicio prunte de JKP Pochoden en HOŘICE sub titolo LA INFANOJ DE 35 LANDOJ KAJ DE 5 KONTINENTOJ DESEGNAS PACON. Partoprenis 1680 de vizitintoj.

La porkomencanta kurso estis malfermita la 5-an de oktobro 1983.

La 27-an de oktobro okazis la prelego kun projekciado de filmoj pri Nederlando far de k-do HERMANN sub titolo EN POSTSIGNOJ DE J.A.KOMENSKÝ.

## ZNOJMO

La 9.9.1983 estis komencita la kurso por komencantoj kaj la 16.9. konversacia kurso, entute kun 21 partoprenantoj. Instruas en ambaŭ kursoj s-ano V. ROTREKL, kiu inaŭguris la instruadon per la parolado pri la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto.

La 6.11. 1983 okdekjariĝis aktiva kaj oferema s-ano KAREL DOHNAL EL ZNOJMO. Sincerajn dezirojn de plena sano kaj bon-humoro deziras ĉiuj klubanoj.

## BRNO

Plua grava entrepreno de EK estis aranĝo de la solena koncerto " Per kanto al paco ", okazinta la 15.11.1983 sub kulmine artisma gvido kaj prezento de prof. H. Supová-Halířová . La koncerto okazis ankaŭ sub la signo de proksimiĝanta inaŭguro de Nacia Teatro kaj perfekta prezento de riĉa kaj varia programo faris ĝin al ĉiuj neforgesebla kaj memorinda.

Bonvolu noti ŝanĝojn de la novaj korespondadresoj:

Esperanto-klubo TRUTNOV - skribu al:
Vlasta JANÁKOVÁ, Smetanova 26, 541 01 TRUTNOV 1, ČSSR.

Eksa adreso de la INTERKLUBO PARDUBICE, EK ĉe UK RSM TESLA, Hronovická 406, PARDUBICE - de nun skribu al:
Linhart RÝZNAR, Na Okrouhlíku 953, CS - 530 03 PARDUBICE.

EK LA PROGRESO ČESKÉ BUDĚJOVICE - nova adreso:
Esperantista Klubo LA PROGRESO poŝtkesto 8, CS - 370 11 ČESKÉ BUDĚJOVICE - VLTAVA.

## NI KONDOLENCAS

En alta aĝo de 92 jaroj forpasis la 6-an de aprilo 1983 en UHERSKÉ HRADIŠTĚ la longjara prezidinto de la Slovaka E-klubo /SEK/ s-ano Ruda KUBÍČEK, konata akademia pentristo kaj grafikisto, profesoro de la meza artindustria lernejo en UHERSKÉ HRADIŠTĚ. Sub lia prezidanteco atingis la loka klubo kaj la tutregiona E-movado en Moravia Slovakio grandajn sukcesojn. Lia multflanka aktiveco kaj fidelaj servoj al la klubo daŭre restos en nia memoro.

La 29-an de junio 1983 forpasis subite la longjara anino de la loka grupo de ČEA en PODĚBRADY, s-anino Miroslava ŠTĚPÁNKOVÁ, en la aĝo ne tutaj 65 jaroj. Ŝi siatempe kelkajn jarojn instruis en la E-klubo de PODĚBRADY Esperanton. La funebra ceremonio okazis la 7-an de julio 1983 en la ceremoniejo de la tombejo de PODĚBRADY. Dum la funebra ceremonio diris kelkajn vortojn pri la forpasinta anino kaj ŝiaj meritoj por Esperanto al la ĉeestantaro prezidanto de la loka grupo de ČEA en PODĚBRADY J. SKRAMUSKÝ.

Kaj la jaroj pasas..."/ pri la esperantista aktiveco de ŝiaj gepatroj, en kio ankaŭ li estis helpanto. Ota estas membro de ČEA.

/JM/

HONORON AL ILIA MEMORO!

La 8-an de septembro 1983 mortis post mallonga grava malsano longjara esperantisto, membro de E-klubo HRADEC KRÁLOVÉ, s-ano Jozefo DOLEŽAL el VELKÉ PETROVICE.

La 11-an de septembro 1983 forpasis 79-jara MUDr. Jozefo ČERNÝ, longjara esperantisto en NÁCHOD.

Božena SKLENČKOVÁ, 86-jara, esperantistino de j.1914, mor-



tis la 15.9.1983 en PRAGO. Kun sia edzo Ota ŝi aktivis en la iama Teritoria Oficejo de UEA en ČSR /notite en la "ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO"/. Ŝia filo Ota SKLENČKA, nia konata aktoro, rakontis en Radio PRAGO en oktobro 1983 /"A léta běží ...

# KRONIKO

La 16.8.1983 ĝisvivis en plena mensa vigleco 90 jarojn s-anino Marie ADAMCOVÁ, honora membro de EK BRNO, anino de la klubo ekde la jaro 1926, do plenajn 57 jarojn. Dum la tuta tempo fidele, ofereme, sindone ŝi aktivis, partoprenis aktive ĉiujn klubajn aranĝojn. Speciale menciita estas ŝia reĝisorado de la klubaj teatraj vesperoj, kio apartenis dum pluraj jaroj al glora periodo de EK BRNO. Krome ŝi kolektis ĉ.60 infandesegnaĵojn, kiujn ni sendis en Brazilon, okaze de infan-ekspozicioj. La desegnaĵoj estis ekspoziciitaj en pluraj urboj de Brazilio kaj rikoltis unuajn premiojn. Al la jubileantino elkore ni deziras ankoraŭ multajn jarojn en plena sano kaj vigleco por ĝoji el sukcesoj de la movado, al kiu ŝi dediĉis sian vivon. Ankaŭ s-anino ADAMCOVÁ aktivis dum jardekoj en Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco.

La 20-an de septembro 1983 ĝisvivis en BOJKOVICE 70 jarojn de sia vivo s-ano Jan TICHOŇ, kunfondinto kaj longjara arkivisto de la Slovaka Esperanto-klubo /SEK/ en UHERSKÉ HRADIŠTĚ. Kiel kluba arkivisto li meritas pri la savo de multaj gravaj materialoj pri la klubo, kies kelkaj aktivaj membroj pereis en la naziaj koncentrejoj.

S-ano TICHOŇ pasie kolektadis ĉion, kio rilatis la E-movadon en UHERSKÉ HRADIŠTĚ kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Antaŭ nelonge li donacis ĉiujn siajn kolektojn, precipe tre valoran E-bibliotekon, al la Urba nacia komitato en la urbo BOJKOVICE, lia nuna loĝloko. Oni jam decidis, ke la valoraj E-objektoj trovos konstantan lokon en la rekonstruata kastelo NOVÝ SVĚTLOV, apartenanta al la Slovaka muzeo en UHERSKÉ HRADIŠTĚ.

Antaŭ 100 jaroj, la 10-an de novembro 1883 naskiĝis en urbeto VELEŠÍN apud České Budějovice kunfondinto de la ĉeĥa Esperanto-movado, prezidanto de EA ČSR, redaktoro de "ESPERANTISTA" kaj aŭtoro de libroj, profesoro d-ro Stanislav KAMARÝT.

Kadre de tiu jubileo lia HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN ČSSR nun aperinta fariĝas rememora omaĝo al la multmerita esperantisto. La filozofia revuo "SIMPOZIO" /Brazilo/ represis lastatempe parton el la "FILOZOFIA VORTARO" de la Stanislav KAMARÝT.

/JM/

## JAROSLAV MAŘÍK - sepdekjara

ESTAS PRESKAŬ NEKREDEBLE, KE TIU JUNASPEKTA, NELACIGEBLA - ĈIAM KAJ ĈIE AĜANTA HOMO ESTAS JAM SEPDEKJARA !

SED VERE, SAMIDEANO MAŘÍK NASKIĜIS 22an DE DECEMBRO 1913.

EN LA JARO 1934 LI FARIĜIS ESPERANTISTO.

EN LA ESPERANTO - MOVADO ESTAS JAROSLAV MAŘÍK ĈEFE KONATA KIEL FUNKCIULO KAJ TRADUKANTO. LI TRADUKIS AŬ LINGVE PREPARIS CENTOJN DA ARTIKOLOJ, GVIDLIBROJ, INFORMLIBROJ, MANLIBROJ, SED ANKAŬ BELETRAJN PROZAĴOJN KAJ ALIAJN.,

ONI NE DEVAS FORGESI, KE LI ESTIS UNU EL PLEJ GRAVAJ AGANTOJ EN RADIO PRAHA POST LA DUA MONDMILITO, KIE LI PREPARIS, TRADUKIS KAJ PAROLIS ESPERANTO- ELSENDOJN. SAMIDEANO MAŘÍK ESTAS ANKAŬ KONATA

ESPERANTOLOGO; LIAJ LINGVAJ , TERMINOLOGIAJ LABOROJ KAJ ESPLOROJ EN HISTORIO DE ESPERANTO MOVADO EN NIA LANDO NE ESTAS ANKORAŬ SUFIĈE APRECATAJ.

NI DEZIRAS AL SAMIDEANO MAŘÍK MULTE DA SANO, MULTE DA JAROJ KAJ PORESPERANTAN LABORON.

# VIZITU ESPERANTO-ARANĜOJN 1984

PERE DE NIA ASOCIO EN BULGARIO

Por aliĝi uzu mendilon,kiun vi trovos meze de tiuĉi STARTO.Atente notu ĉiujn necesajn datojn. Informu ankaŭ vian ĉirkaŭaĵon ne esperantistan.

| n-ro de arango | nomo de arango /kaj enhavo / | dato | prezo en Kĉs |
|---|---|---|---|
| BP-01 | INTERNACIA ESPERANTO ŜAK- SEMINARIO EN PISANICA<br>- teoria,praktika kaj psiĥologia kurso pri la ludo, ŝakturniro,renkonto kun ŝakklubo en SMOLJAN, esperanto kurso, ekskursoj,ĉiu vespere diskoteko.<br>- unua servo - vespermanĝo 01/VI<br>- lasta " - tagmanĝo 10/VI | 01-10/VI | 1.600,- por 2 lita ĉambro<br>1.500,- por 3-4 lita ĉambro |
| BP-02 | ESPERANTO-KURSOJ POR INSTRUISTOJ EN PISANICA / 20 tagaj /<br>-4-5 lernohoroj matene por ĉiuj gradoj kaj por instruistoj, riĉa programo posttagmeza, ekskurzoj, sportaj ludoj, bivakfajro, film prezentado, ĉiu vespere diskoteko.<br>-unua servo - vespermanĝo 01/VII/84<br>-lasta servo - tagmanĝo 20/VII/84<br>- same en augusto<br>Ĉiuj partoprenantoj rajtas lerni Esperanton ankaŭ en niaj kursoj. | 01-20/VII kaj 01-20/VIII | 3.100,- por 2 lita ĉambro<br>2.900,- por 3-4 lita ĉambro<br>2.700,- por 6-8 lita ĉambro |
| BP-03 | INTERNACIA PIONIRA ESPERANTO-ARANĜO /PISANICA/<br>-esperanto kurso, vizitado de pionira domo en SMOLJAN, etnografia muzeo, bivakfajro, amuzaj ludoj kaj vesperoj<br>-unua servo vespermanĝo 21/VII<br>-lasta servo - tagmango 30/VII | 21-30/VII | 1.350 por 3-4 lita ĉ.<br>1.250,- por 6-8 lita ĉ. |
| BP-04 | ĤORUSA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN PISANICA<br>-esperanto-kurso,ĥorusoj el Pollando,Hungario,Bulgario,ĈSSR, ĥorus - konkurso kaj prezento en SMOLJAN, varia kaj riĉa posttagmeza programo, busekskursoj, bivakfajro,disko.<br>- unua servo vespermanĝo 21.VIII<br>- lasta servo tagmanĝo 30.VIII | 21-30/VIII | 2.200,- 2-lita<br>1.300,- 3-4 lita ĉ.<br>1.150,- 6-8 lita ĉ. |
| BP-04 | INTERNACIA BLINDULA ESPERANTO RENKONTIĜO EN PISANICA<br>-interesa programo por blinduloj kun iliaj akompanantoj | 01-07/IX | 950,-- 2-lita<br>890,-- 3-4 lita ĉ.<br>800,-- 6-8 lita |
| BP-05 | ESPERANTISTA RENKONTIĜO DE GOO LUDANTOJ EN PISANICA<br>- partoprenos instruistoj el Japanio<br>- popularigo de la ludo goo<br>- goo turniro inter partoprenantoj<br>- demonstraciaj ludoj, varia programo posttagmeze<br>- esperanto-kurso | 01-14/IX | 2.050,- 2-lita<br>1.900,- 3-4 lita ĉ.<br>1.750,- 6-8 lita ĉ. |
| BP-06 | NOVJARA ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN PISANICA<br>- interkona vespero, ekskursoj al SMOLJAN kaj PAMPORO, esperanto-kurso " parolata rondo" , novjara balo kun programo, ĉiu-vespere diskoteko<br>- unua servo vespermanĝo 29.XII/84<br>- lasta servo tagmanĝo 02.I./85 | 29/XII - 02/I-85 | 1.100,- 2-lita<br>950,- 3-4 lita ĉ.<br>850,- 6-8 lita ĉ. |



## ESPERANTO - KURSOJ DUM LA JARO 1984 EN PISANICA

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| januaro | 03-16<br>16-29 | junio | 01-14<br>16-29 | novembro | 01-14<br>14-29 |
| februaro | 01-14<br>15-28 | julio | 01-20<br>21-30 | decembro | 01-14<br>15-28 |
| merto | 01-14<br>16-29 | aŭgusto | 01-20<br>21-30 | | |
| aprilo | 01-14<br>16-29 | septembro | 01-14<br>16-29 | | |
| majo | 03-16<br>17-30 | oktobro | 01-14<br>16-29 | | |

Le prezo inkluzives plenan pensionon , mengadon 3 foje tage,4 lernohorojn matene kaj programon kun tri ekskursoj,

Prezoj: 7 taga restado
2-lita ĉ: 1.150,--Kčs
3-4 " ": 1.050,--Kčs
6-8 " ": 980,--Kčs

14 taga restado
2-lita ĉ: 2.300,--Kčs
3-4 " ": 2.100,--Kčs
6-8 " ": 1.960,--Kčs

20 taga restado
2-lita ĉ: 3.250,--Kčs
3-4 " ": 3.050,--Kčs
6-8 " ": 2.850,--Kčs

interkonon kaj adiaŭan vesperojn,prelegon kun diapozitivoj,tuttagan laboron de E-gvidanto kun la grupo.

---

KORESPONDI
**DEZIRAS**
ANONCOJ

Per ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk.Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Pri literaturo,muziko,sporto dez.kor. kun gejunuloj 16 - 18 j. Galina TICHONOVA, SU - 601590 p. VELIKODVORSKIJ, Vladimirskoj Obl., ul.8.Marta 16.

Korespondamikojn serĉas Iwona GRAJEK /16-jara/, Zamysłów 51 s.27, 67-407 Szlichtyngowa, Pollando /int.pri biologio kaj historio/.

Kepa MAŁGORZATA, Lgota Mała 26, pocz. TEKLINÓW 42 - 281, woj. Częstochowa, Pollando.

PM, bankbiletojn kaj BK kolektas kaj pri filatelio, muziko, akvarismo kaj turismo interesiĝas 21-jara Tadeusz TRENDZIUK, 08-300 SOKOLÓW - Podl., ul.Boh.Chodakova 41/2,Pollando.

18-jara knabino serĉas amikon aŭ amikinon: Halina WOJTCZAK, Bielin 11, 74-127 MOVYŇ, Pollando.

28-jara teknikisto dez.kor. kun geesperantistoj pri gramodiskoj, historio, turismo. Bohumil PROCHÁZKA,Hejtmanská 40, 198 00 PRAHA 9 - KYJE, Ĉeĥoslovakio.

14-jara knabino dez.kor.tutmonde,kol.PM,BK pri fremdaj landoj, pri bestoj. Int.pri filmoj kaj aktoroj. Katrin BLANKE, Rosenthaler Str.2, DDR - 1054 BERLIN.

Mirosław SKÓRKA, ul. Rewolucjonistów 61a/7, 40-833 KATOWICE, Pollando dez.kor. kaj interŝ.PM kaj glumarkojn kun aŭtomobiloj, ŝipoj, aviadiloj.

Geamikojn serĉas Bogusław SKRZYŃSKI, 84-312 CEWICE 77, woj.Słupsk, Pollando.

---

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,Jilská strato 10, 110 0 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio.Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko KŘIMSKÝ. Grafika aranĝo Milan LABAŠTA. Desegnaĵoj Pavlo RAK. Transdonita al presejo la 30-an de novembro 1983. Jarabono Kĉs 24,--, por eksterlando Kĉs 36,-- aŭ 10,50 gld, inkluzive sendkostojn.Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.


STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu,Jilská ul. 10, 110 0 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko KŘIMSKÝ. Grafická úprava Milan LABAŠTA. Kresby Pavel RAK. Tisk zajišťuje technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku dne 30. listopadu 1983. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č. jedn. P/1 - 1267 ze dne 6. dubna 1979.




*Dobre nakúpite*

**POTRAVINÁRSKY A PRIEMYSELNÝ TOVAR**
v obchodných domoch
**SPOTREBNÝCH DRUŽSTIEV**

JEDNOTA



VO VÄČŠINE NAŠICH OBCHODNÝCH DOMOCH
JE ZABEZPEČENÉ OBČERSTVENIE A **PODÁVANIE STRAVY**




# DIVERSAJ ŜARĜAŬTOMOBILOJ

## AVIA A21 · AVIA A31

AVIA n.p. PRAHA 9 - LETŇANY
zavody BRNO, IVANČICE, ŽILINA